

Valerij SIPOVIČ

SEKRETO DE LA PATRINO



Novelo

Moskvo
«Impeto»
2006

[www: impeto.ru](http://www.impeto.ru)

ББК 84-Эсп
С39

Valerij Sipoviĉ
Sekreto de la patrino
(на языке эсперанто)

Pentristo *Vjaĉeslav Te*
Respondeca redaktoro *Aleksandr Ŝevĉenko*

Сипович В.В.

С39 Sekreto de la patrino / Валерий Сипович. Секрет матери : Повесть. На языке эсперанто. – М.: Импето, 2006. – 112 с.
ISBN 5-7161-0154-2

Лирическая повесть Валерия Сиповича описывает события, происходившие в Восточной Сибири в период с 1918 по 1945 год.

Для широкого круга читателей, владеющих языком эсперанто.

ББК 84-Эсп

ISBN 5-7161-0154-2

© Sipoviĉ V.V., 2006
© «Impeto», aranĝo, 2006

www: impeto.ru

SEKRETO DE LA PATRINO

novelo

La aŭtuno 1918 en la Orienta Siberio estis plorama. Preskaŭ ĉiutage, jen ekde mateno ĝis tagmezo, jen ekde tagmezo ĝis vespero malvarme pluvetis. Vojoj kaj vojetoj kotigis, sub piedoj rane kvakis argilo. En unu el tiaj kurtaj grizaj tagetoj, al la vespero, en la domon de la distrikta doktoro Aleksej Miĥajloviĉ Bogojavlenskij, rabpenetris la granda, terura malferliĉo – subite mortis la mastro mem. Mortis Aleksej Miĥajloviĉ ne ene de la domo, sed tutapud ĝi. Mortis absurde kaj tuje. Okazis la jeno. Kiel ĉiam, ĉe pleja tagforiĝo, en krepusko, la doktoro revenis de la oficejo kun la ĉiama kofro enmane. La tago videble estingiĝis, la krepusko griziĝis, densiĝis, transformiĝis en aŭtunan malkomfortan obskuron.

Turninte sin de la ĉefstrato en la interstrateton, Aleksej Miĥajloviĉ, por ne perdi en la kaptema argilo la galoŝojn, ekiris laŭ la pado ĉe la bariloj kaj palisaroj – ja la padeto estis sufiĉe dura pro la simpla kialo, ke ne damaĝis ĝin la radoj de ĉaroj kaj kaleŝoj. Kaj okazis ja tiel, ke preterirante la aĵuran feran enveturpordegon de la negocisto de la dua gildo Zot Jerofeeviĉ Serjmmjagin, la doktoro Bogojavlenskij grave ekglitis sur la kotmakulita ŝtonpavimo kontraŭ la pordego, perdis la ekvilibron, dorsenkliniĝis kaj falis, batinte la tempion kontraŭ la konusa granita ŝtono. Tiaj ŝtonoj estis nepre enfositaj teren antaŭ la flankajoj de pordegoj ĉe riĉaj domoj, por ke en-

www: impeto.ru

veturante la korton la koĉero de faetono aŭ ĉaristo ne trafu hazarde per la rado aŭ akso la kalkan eksterajon de la pordeggkonturo.

Do, ĝuste kontraŭ la ŝtona pordeggardisto de la bieno de la negocisto Serjmmjagin frakasis sian kapon la doktoro Bogojavlenskij.

La morto neniam venas ĝustatempe al iu ajn, sed al la domo de Aleksej Miĥajloviĉ ĝi sin trudis speciale malbonokaze, ne konvenmomente. Tiel parolis la tuta urbo Lednjov, eksciinte pri la tragedio.

Ĝi, vere, estis tiel. Precize antaŭ kvin monatoj, tuj post la Pasko, la firmkonvinka fraŭlo doktoro Bogojavlenskij, dum la tridekkvina jaro de sia libera kaj sufiĉe ŝtorma vivo, tamen subiĝis al la persvadoj de la fratino Varvara Miĥajlovna kaj edziĝis en la loka templo kun la fraŭlino Jelena Pluŝĉeva, kiu tagon antaŭ la hela festo Resurekta iĝis dekokjara. Amikoj kaj konatoj (kaj konis la distriktan doktoron Bogojavlenskij preskaŭ la tuta adolta loĝantaro de Lednjov) multadmire parolis pri la fianĉino de Aleksej Miĥajloviĉ. Kaj kelkaj liaj amikoj-kamaradoj el la fraŭla "liberio" malkaŝe enviis lin. Jes, estis pro kio envii! Lenjo Pluŝĉeva ne vane estis taksata kiel unu el la plej belaj junulinoj de la urbo: la grandegaj brunaj okuloj lumigis la vizaĝon, dika malhela harplektaĵo ĝis la zono kombine kun la vespa talio, altaj firmaj mamoj kaj sveltaj, kiel oni tiutempe diradis, – tornitaj kruretoj. Ĉe vido de tiu ĉi ĉarmo la koroj de multaj, tre multaj junuloj komencis rapidbati. Aldone, estis Lenjo konsiderinde klera: la gimnazion finstudis perfekte, posedis la francan kaj scipovis dece tajpi per tajpmaŝino.

Certe, alitempe la belulino Lenjo povus haltigi sian elektadon ĉe fianĉo multe pli alloga, ol tiu doktoro Bogojavlenskij – la viro ne nur matura, sed eĉ tro matura, aldone posedanta rimarkeblan ventreton kaj kalvaĵon sur la supraĵo de la granda kapo. Sed

Lenjo havis nek tempon, nek eblecon atendi ĉe la sojlo junetan princon en luksaj vestaĵoj, kiu alvenus en tiun ursan angulon, trans trioble-naŭ-landoj, por peti ŝian manon kaj koron. Ŝi estis, tiel nomate, en senelira stato – duonjaron antaŭ la svatiĝo ŝi restis plena orfino. Paĉjo ŝia, la direktoro de la urba gimnazio, mortis jaron antaŭe pro la koratako. Panjo, la milda kaj kompatema Anfisa Grigorjevna, estis tiom skuita pro la morto de la edzo, tiom bedaŭregis pri li, ke du monatojn poste ŝin trafis apopleksio, kaj ŝi, turmentigante dum dek tagoj, silente estingiĝis, ne sukcesinte diri ion tre gravan al la filino, kiu nek tage, nek nokte ŝin lasis. Kaj evidentas, ke la panjo ion tre gravan volis al ŝi diri. Pri tio ŝiaj okuloj ĉiam parolis. Sed ŝi ne ekpovis. Tamen, la malfeliĉa Lena baldaŭ mem konjektis, kion do volis diri por la fino la kara, bonkora patrinjo. Vivi sole, memstare, Lenjo tutsimple ne scipovis. Havi servistaron same ne povis, ĉar neniujn apartajn ŝparaĵojn, neniujn ŝikajn juvelaĵojn la noblega direktoro de gimnazio kaj lia bonkorega edzino akiris dum la dek ok jaroj de la kunvivado. Kompense vivis ili, kvankam ne lukse, sed en plena amo kaj rara konsento. Kaj tio malgraŭ ke Ivan Sergeevič estis je dek sep jaroj pli aĝa ol lia Anfinjo, kiel li ŝin senŝanĝe nomis.

Nun Lena urĝe bezonis apogon, la muron, malantaŭ kiu ŝi povus sin kaŝi de la malvarmigaj ventoj de la maltrankvila vivo, kiuj blovadis tra Rusio antaŭ la Oktobra revolucio en la jaro 1917. Tiu muro, apogo povis iĝi nur la edzo.

La svatistino Praskovja Ivanovna Prjaĥina, la malgranda vigla maljunulino, estis konata al la tuta Lednjov. Multaj mastrinoj de familioj ŝuldis al ŝi sian sukcesan vivaranĝon. Samtiel multaj patroj de la familioj tre afable klinsalutadis ŝin ĉe renkontoj.

Praskovja Ivanovna, aŭ simple Panja, estis svatistino laŭ la destino. Verŝajne, surĉiele, ĉe ŝia naskiĝo,

anĝeloj elektis por Panja la oficon de la surtera Amoro – la kuniganto de la koroj de junaj kaj maturaj viroj kaj virinoj. Apenaŭ edziniĝinte je la deksepjaraĝo, Panja tuj ekis serĉi fianĉojn por siaj amikinoj, poste – por iliaj parencoj... kiel ekis, tiel daŭris. Memkompreneble, klopodis ŝi ne kontraŭ la nuda intereso, sed kontraŭ la premio, tamen ne troa por la gefianĉoj.

Apenaŭ en la domo de Pluŝĉev eksaj kolegoj kaj amiko de Ivan Sergejeviĉ, najbaroj kaj najbarinoj de la familio funebri la kvardek tagojn post la forpaso de Anfisa Grigorjevna, tuj ĉe la sojlo de la domo aperis avinjo Panja. Lena tuje ekklopodis ĉe l'samovaro, bonege memorante, ke la fama svatistino pro «fartu bone» fremdan hejmon ne vizitas.

Dum bruliĝis la fajro en la sino de la ventroza kupra samovaro, la svatistino ekis plekti la parolon:

– Nu, do, kolombinjo mia admirata, ĉu maldolĉe travivas vi sen la paĉjo-panjo?

– Malbone travivas, avinjo Panja, sopire. Kaj foje eĉ time. Speciale dum noktoj time. Ĉe ajna susuro mi saltellitiĝas, kandelon bruligas. Daŭre ŝajnas al mi, kvazaŭ malicaj homoj – ŝtelistoj la domon volas engrimpi. Kvankam kion eblas de mi forpreni? Tamen, timas mi, – honeste konfesis Lena.

– Ja, kial ne timi? Vi nun, kolombinjo, estas kiel soleca junbetuleto meze de la vasta kampo: de kie ajn ekblovu la vento – ĉio tremigas kaj timigas, ĉar ja ne estas malantaŭ kiu sin kaŝi. Estas apud vi nek kverko alta, nek poplo svelta. Jen do – rompiĝos vi, malbenhore.

Lena surtabligis du tasojn kun la subtasetoj, sukerujon, en kiu blankis nur kelkaj pecetoj de la rompenda sukero, kaj vazeton kun la ĉeriza konfitaĵo. Ĝin la lastan fojon kuiris la forpasinta mastrino de tiu ĉi hejmo.

– Avinjo Panja, vi pardonu min bonvole pro tiom modesta regalo. Jen pensas mi dungigi en la

kontoron al sinjoro Urusov. Monon ja mi preskaŭ tute ne havas, – pravigis sin Lena, montrante al la dolĉaĵoj.

– De kie ĝi estu ĉe vi, knabinjo mia admirata? Ĉiuj en la urbo sciis, kia sentrezorulo estis via forpasinta paĉjo, regnon al li ĉielan, – sin krucsignis la svatistino, rigardante al la ikono de la Savanto, ĉe tio iom ekstarinte desur la seĝo. – Al multaj li monhelpis, sed redoni nemultaj rapidis. Nu, ne gravas, kolombinjo vi mia violflugila! La afero estas korektebla.

La koreto de Lena ekbatis ofte-ofte: nun ŝi ekscios la plej gravan, destinitan por si. Ja ne vane venis al ŝi la svatistino avinjo Panja! «Kiu do li estas?» – apenaŭ retenis ŝi la demandon. Sed demandi ŝi neniel povis. Necesis atendi.

Sed Praskovja Ivanovna, ĝuante sian signifon antaŭ la okuloj de la junbelulino, ĉirkaŭrigardis la manĝejon de la jam eksa direktoro de gimnazio kaj daŭre retenis la respondon al la muta demando de la knabino. «Malriĉete, tamen, vivis la sinjoro, malriĉete», – resumadis siajn observojn la svatistino. Kaj estis prava: en la primitiva bufedo tra la vitroj de la pordetoj videblis simpletaj kruĉoj, subtasoj, pokaloj. La tablon, bufedon kaj seĝojn, laŭ ĉiuj signoj, majstrumis por la direktoro de la gimnazio la fama en la urbo ruĝlignaĵisto Jefim Jermolov, kiu havis kaj «manojn orajn, kaj gorĝon stantan». Tiel diradis liaj klientoj-lednjovanoj. Ne vane diradis: labori Jefim povis tradiurne, preparante bufedojn, tablojn kaj seĝojn, tamen povis ankaŭ dum semajnoj drinki la «amaran». Li faris la meblon simplan, sen superflujaj troaĵoj-ornamaĵoj kaj ceteraj bagatelaĵoj, sed kompanse fortikan kaj fidindan.

Ekbruis la samovaro. Lena ĵetis en la infuzujon pinĉprenon de la ĉina teo, surverŝis ĝin per la bolakvo.

La teon trinkis ĉefe la avinjo Panja – la tetrinkado estis por ŝi nepra ceremonio antaŭ la plej grava parolo. Sed jen ŝi renversis la malplenan tason sur la subtason, kio signifis finon de la teumado.

– Nu, do, kolombinjo Jelena hel’ Ivanovna, ni ekparolu senkaŝe, – diris la moliĝinta pro la varmega teo svatistino kaj malligis la kaptukon.

– Ni parolu senkaŝe, – konsentis Lena.

– Do jen, notis mi por vi tre indan fianĉon.

– Kiun? – ne eltenis Lena kaj densdense ruĝiĝis. – Ĉu mi lin konas?

La svatistino duonridetis.

– Ja lin la tuta urbo konas, kolombinjo, la doktoron nian, Aleksej Miĥajloviĉ Bogojavlenskij, vi ja vidis lin, konas, ĉu?

– Aleksej Miĥajloviĉ! – konsterniĝis Lena, – sed li ja estas...

Ŝi stumblis.

– Ĉu vi volas diri, ke li estas maljuna por vi? Ĉu mi divenis?

Lena responde nur kapjesis. La okuloj ŝiaj iĝis tristaj-tristaj.

– Ĉu maljuna? Tridek kvar jarojn de la naskiĝo. Vi ja estas ankoraŭ tre juna kaj pri la viroj nenion komprenas. Sed mi al vi diros tiel: la viro dum tiuj jaroj estas en la pleja matureco kaj difinitive stabiliĝinta en la vivo, – komencis sian batalpreparon la lerta svatistino, kiu dum kvardek kun plio da jaroj de sia malfacila laboro en la ofico de la surtera Amoro sukcesis svati dekojn da junaj virgulinoj al kvindek-jaraj olduloj.

– Nu, bone, trovos mi por vi fianĉeton aknozan, nu, deknaŭjaran. Kaj kion vi kun li, kolombinjo, faros? Ĉu kaŝludos? Sur liaj lipoj ankoraŭ panja lakto ne sekiĝis kaj li nenion per si mem prezentas, nenion scipovas. Krom, eble, la solan,.. – la avinjo Panja vortstumblis.

– Kion nome? – naive demandis Lena.

La svatistino ekridis abrupte kaj sonore.

– Ideto vi estas ankoraŭ, fianĉinjo. Ideto. Rememoru do, kion faras matene koko kun kokinoj? Tretas li ilin, tretas, por ke el kokina ovo povu koki-do elŝeliĝi. Ja sen la koka sursalto kokino kokidon ne kovos. Ĉu vi komprenis? Lena fajre ruĝiĝis, emis ekstari por ien de la honto sin kaŝi, sed la avinjo Panja subite rapide, milde alkroĉe kaptis ŝian manon.

– Ne kapriolu, kolombinjo. Kial vi ekruĝis kvazaŭ skarлата floro? Ŝajnas, vi ne scias, kiel oni infanetojn faras. Sidu kaj aŭskultu, kion al vi la olda Panja diros. Kaj diros mi al vi la jenon: Aleksej Miĥajloviĉ estas homo ĉiuflanke inda. Kuracisto, havas bonan salajron, domon, estas vestita, ŝuita. Kaj ankoraŭ konsideru: kune kun li en tiu hejmo dum du jaroj jam loĝas lia samsanga fratino – old-virgulino Varvara. Ŝi estas por li kaj lavistino, kaj kuiristino, unuvorte – ne fratino, sed reala servistino, servantino. Tial vi ne devos tuj la familian jugon surkoligi, sole la mastrumadon prizorgi: lavi, gladi, kuiri, friti. Kaj ĉar Varvara ne estis edziniĝinta, kvankam penis mi ŝin foje-du svati, do, kompreneble, vian infanon ŝi nepre flegos. Denove – al vi helpo serioza. Estas ŝi, kiu persvadis la fraĉjon fin-fine ekhavi familion. Ŝi, Varvara, malfructe malblindiĝis al tio, ke virino devas havi familion, infanojn, aliel amarus ŝia maljuneco. Nu, kaj ke aĝas jam Aleksej Miĥajloviĉ, vi rememoru, je kiom da jaroj via paĉjo estis pli aĝa ol la panjo?

– Je dek sep, – balbutis Lena.

– Kaj je kiom ol vi pli aĝas Aleksej Miĥajloviĉ?

– Je dek ses.

– Jen! Li, do, je tuta jaro pli frue, ol via paĉjo, intencas edziniĝi. Kaj kiel vivis viaj gepatroj? Unu-anime! Bonis, do, Ivan Sergeeviĉ, se via panjo tiel

mortigsuferis pri li post lia forpaso. Sed vi: «maljuna, maljuna».

Tiu ĉi ĉefa atuto de la svatistino difinitive forblovis ĉiujn dubojn de la bela fraŭlino Jelena kaj ŝi konsentis por la svatiĝo.

Kaj jen li, kara, amata ŝia edzeĉjo kuŝas en la ĉerko, sur la tablo en la gastejo: Dio, kiom mallonge ili kunvivis, kiel rapide ruiniĝis ŝia apogo, ŝia muro!

Ŝi tre nebule memoris la rekviemon en la preĝejo, la vojon al la tombejo, tamen ŝi sciis, ke li ankoraŭ apudas. Sed jen la ĉerkokovrilo kaŝis lian korpon, lian vizaĝon: kaj ĉio. Nur la obtuzaj batoj sur la ĉerka surfaco, susuro de la falanta el-sub la fosiloj tero, ies plorĝemoj. Nur tiumomente ŝi finfine eksentis la tutan tragikecon de la okazintaĵo, la tutan dramon de sia sorto kaj de la sorto de tiu, kiu ĉi tie, en la tombejo, anoncadis pri sia intenco eliri en tiun helan maltrankvilan mondon. Ĝi moviĝis pli kaj pli klare, forte. Eksentinte netoleremajn, incitajn puŝojn, Lena ekvoĉis, sinĵetis al la malprofundiĝinta tombo, kaj se ne zorgaj, firmaj manoj de la du kolegoj de la forpasinta edzo, ŝi tutcerte glitfalus en la tombon. Kvazaŭ vundita cignino, Lena tremegis en la viraj brakoj, ion kriis, vokante la edzon reveni al ŝi.

– Jen kiel ŝi sin mortigas, plagulino. Do, forte ekamis ŝi la edzon. Diraĉis oni, ke komence ŝi eĉ aŭdi pri li ne volis. Klaras – jen je kiom li estis pli aĝa, ol ŝi! – flustris la kuiristino Nastja el la domo de la komercisto Serĵmjagin al sia kunulino, la servistino Ksjuŝa el la domo de Fotij Dormidontoviĉ Akulov, la ĉefa kontisto de la arbarkomerca firmao «Urusov kaj K^o».

– Ĉu vi diras – pli aĝa? Nu, ŝia patro Ivan Sergeeviĉ, regnon al li ĉielan, ankaŭ ja estis jen kiel pli aĝa ol Anfisa Grigorjevna, – samflustre reeĥis Ksjuŝa. – Kaj tiu, kompatinda, tiel al li kunfandiĝis, ke ne ekdeziris porlonge de la edzo disiĝi. Preskaŭ tuj lin

sekvis al la alia mondo, estu por ŝi la tero lanuga. – Ksjuŝa verve sin krucsignis kaj daŭrigis: – Jen rigardas mi al Jelena Ivanovna kaj ial ŝajnas-reŝajnas al mi, ke ŝi laŭ la panja ekzemplo povos baladaŭ tien foriri», – Ksjuŝa kapgestis al la tombo.

– Lena denove laŭte ekhurlis, ĉar la tero porĉiam kaŝis ŝian amaton. La muĵikoj* jam formis la tombomonteton.

– La ajna krios, voĉos, se la ido en la sino kapriolas. Ja ŝajne jam vintre ŝi naskos, – enspiris Ksjuŝa. – Se ŝi same plu sin turmentos, eĉ pli frue elĵetos la idon, – kuntirinte la brovojn diris Nastja, – rigardu, junas ŝi, sed tiel sinmortigas.

La inoj, malgraŭ ke estis malkleraj, de la edzoj-drinkuloj forte batitaj, tamen divenis: tial tremegis histerie Jelena, tial kriploregis, ke ĝuste tiujn minutojn la naskiĝonta ido – la daŭrigo de Aleksej Miĥajloviĉ Bogojavlenskij, de ŝia Aljoŝa, ankaŭ baraktadis kvazaŭ plorante en ŝi, ofte-ofte puŝante ŝian ventron deinterne.

«Jes, jes, ankaŭ ĝi nun ĉion vidas, ĉion scias», – turmentiĝis Lena, kaj larmoj rivere verŝiĝis el ŝiaj belaj okuloj. Kial ŝi ne hurlo, ne ploregu, se ŝi, ankoraŭ ne naskinte, jam sciis, ke ŝia bebo, ŝia ido estos devigita trinki el la amara kaliko, sur kiu estos gravurita la vorto-verdikto – «Senpatreco». La juna vidvino Jelena Ivanovna Bogojavlenskaja klare bildigis al si, kian senĝojan infanecon havos ŝia ido, kiel ĝi envios al la samaĝuloj, kuj havos la patrojn. Kaj apud la envio en la animo povos kreski malico. Jen pro tio ŝi nun tiel akre sentis doloron kaj amaron. La senlirco kaj despero forbruligadis la fortojn, senigis de ajna intereso al la vivo. Tiu stato – ĉu duonkonscio, ĉu maltrankvila timiga intermita dormo – ne lasis

* Muĵiko – viro, kamparano, edzo. (Ĉie estas notoj de la redaktoro.)

ŝin dum kelkaj tagoj ankaŭ hejme. Bonis, ke Varvara Miĥajlovna ankoraŭ kapablis paŝi. Bonis, ke apude estis la fidelaj amikoj – kolegoj de Aleksej Miĥajloviĉ.

Laŭ la neskribita Kodo de Honoro de Hipokrato – la granda kuracanto el la antikva Grekio – al la proksimaj parencoj de la mortinta kuracisto liaj kolegoj liveris senpagan helpon. La kuracisto Volobujev Arsenij Petroviĉ vizitadis Jelenon pokelkfoje tage, kaj la flegistino Irina deĵoris apud ŝi tutdiurne. Finfine ne eltenis ankaŭ Varvara Miĥajlovna: la fortoj lasis la 48-jaran bofratinon de Lena: nun ŝi moviĝis malvigle, respondadis maltrafe kaj ofte surdivaniĝis. Ekvidinte la degelantan Varvara Miĥajlovna, Lena tre ektimis. Ektimis ne pro si, sed pro ŝi. Superante nepovojn, ŝi komencis poiomete ellitiĝi: «Mi ne rajtas malsani, ne rajtas ĵeleiĝi. Mi ne rajtas, aliel la infano povos pereii aŭ naskiĝos malsana». Pri tiu trista sekvo de ŝia malbonfarto konstante delikate aludis la doktoro Volobujev, kun kiu la mortinta Aleksej Miĥajloviĉ tre amikis. La juna organismo kaj la grandega deziro de la estonta patrino konservi la infanon, naski ĝin sana, faris la miraklon – Lena resaniĝis, reekvivis. Ŝajnas, ke resaniĝo de la bofratino bone influis ankaŭ al la organismo de Varvara Miĥajlovna. Baldaŭ ŝi denove staris ĉe la stirilo de ilia fragila familia boateto. Tio okazis tre ĝustatempe, ĉar necesis forveturi el la domo. Ĉi tie baldaŭ devos ekloĝi la nova regiona kuracisto. Ja la loĝejo estis fiska.

La agema Varvara Miĥajlovna sufiĉe rapide trovis kaj nemultekoste aĉetis negrandan triĉambran aleton kaj organizis vigran transloĝiĝon.

La infano pli kaj pli ofte memorigis pri sia ekzisto, kaj ĝiaj «ekzercadoj» en la patrino sino firmigis fortojn de Lena kaj Varvara Miĥajlovna, kiu jam perdadis paciencon finatendi la aperon de la parenca hometo al la mondo.

Intertempe la pluvoj ĉesis, matene ekfrapetis frostetoj, proksimiĝis la vintro.

La nasko komenciĝis neatendite, oni ne sukcesis eĉ veturigi Lena al la malsanulejo. Necesis voki akuŝistinon hejmen. En tiu tago ekis la unua neĝo, kaj tuj tia densa, kvazaŭ la vintro ie supre skuis super la tero plumonojn kaj kusenegojn, plenigitajn je cigna lanugo. Kune kun la unuaj flokoj de la neĝofalo en la varme hejtita ĉambro aperis en la mondon Tina.

La vintro prezentigis neĝa, sed ne frosta. Mallongaj promenadoj kun la etulino bonis por ambaŭ. Lena sentis, kiel la antaŭaj fortoj revenas al ŝi, la filinjo rimarkeble kreskis, iĝis pli kaj pli peza. Kaj ĉio ŝajnis bona, krom: krom tio, ke la monŝparaĵoj de la familio digeladis, kiel aprila neĝo sub la sunradioj – rapide kaj neeviteble.

Venis tempo serĉi laboron. Lena, kiu scipovis tajpi, estis dungita de la firmao «Urusov kaj K°». Iun frostan februaran tagon de la jaro 1919 ŝi alportis hejmen sian unuan salajron. Sed tio ne ĝojigis. Lena scias, ke la laboro estas portempa, ĉar neeviteble proksimiĝis la novaj tempoj. Laŭ la urbo disvastiĝadis onidiroj, ke la Ruĝa Armeo proksimiĝas al Lednjov, venkante batalon post batalo blankgvardianojn kaj iliajn subtenantojn – intervenintojn el Ĉeĥoslovakio, Hungario, Anglio, Rumanio... La onidiroj estis akceptataj diverse: de komercistoj kaj riĉuloj – maltrankvile, de laboranta popolo – ĝoje kaj espere, de intelektuloj – embarase.

Novembre 1917 la eĥo de la Granda Revolucio helpe de laboristoj kaj frontanoj, teditaj de la nekomprenebla milito kontraŭ Germanio, atingis ankaŭ Lednjovon – estis anoncita la Soveta potenco.

Tamen baldaŭ la ribelo estis dronigita en sango far oficiroj de tiel nomata «blanka ostoj». La blanka

gvardio ne prizonigis, ne ekzilis, sed sen juĝo kaj esplorado amase pafmortigadis homojn, kies kulpo de kiuj estis nur tio, ke ili revis pli bona sorto ne nur por riĉuloj kaj strikrompantoj. Por kurta tempo en la urbo estis restarigitaj la malnovaj ordoj.

Sed la vento de ŝanĝoj al la plibono neeviteble proksimiĝadis ankaŭ al la forgesita de la Dio Lednjov. Reale al la urbo proksimiĝis la Ruĝa Armeo. La blankgvardianoj haste ekretiriĝis al la oriento, forveturigante plenajn vagonarojn de rabitaĵoj. Kaj en la urbo aktiviĝis la subplanka organizaĵo de socialistoj-bolŝevikoj.

En la vilaĝoj formiĝis komitatoj de malriĉuloj por defendi kamparanaron. Tio estis jam serioza averto al bankistoj, spekulantoj, policistoj kaj ceteraj mastroj de la vivo por prepariĝi al la fuĝo en Ĉemaron. Kvankam restis espero je Kolĉak.

Ekis preparojn al evakuo ankaŭ la firmao «Urusov kaj K^o».

Kaj sur la korto jam susuris per folifaloj septembro 1919. Tina iĝis naŭmonata. Ekprepariĝis forveturi ankaŭ la familio Bogojavlenskij. Pli precize, prepariĝis dume sola Varvara Miĥajlovna. Ĝus post traflugo de la unua onidiro pri proksimiĝo de la Ruĝa Armeo Varvara Miĥajlovna ekselektadis siajn vestaĵojn, elektante la plej valorajn kaj necesajn robojn, bluzetojn, paltojn.

Tiu ĉi energia, fortvola virino ne povis sen korporetremo rememoradi komence la senbridecon de anarkiistoj kaj kriminaluloj, alkroĉiĝintaj al la bolŝevikoj en la jaro 1917, kaj poste la venĝon de la blankgvardianoj. Tamen la revolucia impeto baldaŭ forvaporigis, eknecesis organizi la vivon normalan, trankvilan. Jen tiam disiris al diversaj flankoj la bolŝevikoj kaj anarkiistoj. Rutina laboro ne logis la agresemajn anarkiajn liberecanojn, kies slogano estis bone konata en Rusio: «Anarkio estas patrino de la ordo». La anarkiistoj de Lednjov senkaŝe ekrabis komence la ur-

bajn riĉulojn, iliajn magazenojn, butikojn, domegojn, poste – ĉiujn senelekte. Sed parto de filistroj egaligis tiujn rabojn, kiujn la friponaj anarkiistoj nomis ekspropietigo, kun la aferoj de la nova potenco, do, de la bolŝevikoj.

Satrigardinte al ĉiuj fiagoj de la anarkiistoj-ma-rodantoj, Varvara Miĥajlovna kun singardemo rilatis ankaŭ al bolŝevikoj. Jen kial ĉe la unuaj onidiroj pri la ofensivo de la Ruĝa Armeo, ŝi ekkolektis la aĵojn por la longa vojo.

Lena ne estis entuziasmigita de la preparoj de Varvara Miĥajlovna, tamen kontraŭi ŝi ne kuraĝis. Per sia juna patrino koro ŝi divenis la pezajn sekvojn de evakado. Speciale ekmaldeziris ŝi foriri al nekonateco post mallonga renkontiĝo kun Nastja, la kuiristino el la domo de la gesinjoroj Sirmjagin.

Foje, renkontinte Lena'n en strateto, Nastja senceremonie demandis ŝin:

– Ĉu ankaŭ vi, sinjorinjo, intencas fuĝaĉi el la urbo?

– Jes, ja – Varvara Miĥajlovna insistas. Timas ŝi tiujn: bolŝevikojn.

– Ankaŭ miaj sinjoroj timas ilin. Jam dekduon da valizoj pakis, – kaj, mokridetinte, daŭrigis: – Fuĝi. Sed al kiu ni estas bezonataj, en la fremdujo? Kiucele la lokanoj nin bezonas? Superfluaĵ zorgoj – ne pli. Ne, ne vane ja la proverbo diras: «Kie vi naskiĝis, tie aplikiĝis». Kaj al vi, sinjorinjo, kiu rezono estas kun eta infano vivadi en anguloj de fremduloj? Per la propraj manetoj ja vi vian panon perlaboras. Kiucele vi fuĝas, kaj kun la infaneto?

«Kaj vere – kiucele? Bone, venos tiuj: bolŝevikoj – nu kaj kio? Ĉu la vivo haltos? Ja ne. La homoj egale bezonos manĝi-trinki, infanojn kreskigi. Do, necesos labori, – rezonis Lena, disiginte de la parolema Nastja. – Necesas resti».

Kun tiu konvinko ŝi eniris la hejmon. Varvara Miĥajlovna nutris per kaĉeto Tinjon. Tiu kapricis, forturnadis sin de la arĝenta kulereto kun la semolina kaĉo. Lena demetis stratvestojn, altablighis kaj, sen ajna preparo, firme diris:

– Sed kial ni devas forveturi, Varvara Miĥajlovna? Klarus, se ni estus iuj riĉuloj. Ni ja estas malriĉaj intelektuloj. Krome, mi laboras kiel tajpistino kaj, laŭ la kompreno de la bolŝevikoj, mi estas el la klaso de proletoj. Kion ni timu? Kaj ni havas surbrake la infanon, preskaŭ suĉbebon. Kial ni ankaŭ ĝin turmentu?

Varvara Miĥajlovna pro tiuj vortoj rektiĝis, rigidiĝis kun la kulereto en la mano. La vortoj de la bofratino terure embarasis ŝin.

– Kion vi diras, kolombinjo? Kion mi aŭdas? Ĉu vi forgesis, kion faraĉis tiuj samaj bolŝevikoj fine de la deksepa? Rememoru iliajn ebriajn deboĉojn sur la stratoj. Rememoru, kiel ili rabis vendejojn, butikojn, senvestigis surstrate estimindajn homojn. Ĉu la morto de mia frato forbatis vian memoron? Ne, vi ja, ŝajne, ĉion memoras, restas kun via saĝo.

– Ja ne bolŝevikoj rabis la vendejojn, butikojn, sed tiuj: anarkiistoj. Ĉu vi memoras, kiun sloganon ili pendigis sur la urba administrejo? «Anarkio – patri-no de la ordo», – senkuraĝe kontraŭis Lena.

– Anarkiistoj, socialistoj, bolŝevikoj – ĉiuj estas el la sama ujo. La anarkiistoj havas unu sloganon, la bolŝevikoj – alian: «Rabu rabitan». Kvankam ili ĝin ne pendigis sur la administrejo, sed voĉkriadis dum siaj mitingoj, – patose rebatis Varvara Miĥajlovna. – Vi forgesis, ke bolŝevikoj havas ĉion komunan – komunajn uzinojn, komunajn fabrikojn, teron kaj: virinojn. Jen loĝigos oni al ni iun bolŝevičjon, kaj li vin okulumos. – Jelena eĉ ekstremis pro tiuj vortoj. – Kial vi tremas? Certe, okulumos – vi estas bela virino, alloga. Al tiaj inoj muĵikoj, precipe arogaj, nepre

gluiĝas. Nu, ekplaĉos vi al la bolŝevičjo-enloĝito, prenos li vin je blankaj manetoj kaj kondukos en sian oficejon, en sian administrejon aranĝi la geedziĝon. Sed se vi kontraŭos, li vin tuj prizonigos. Aŭ eĉ pli malbone: enlaborigos li vin kvazaŭ tajpistinon en sian komisarejon, kaj vi tie ĉiujn komisarajn plezurigos – ja ili havas ĉion komunan.

Multon kapablas elpensi la filistra onidiro, timigita de anarki-krimula diboĉo! Tiu mortiga rezon-supozo de la bofratino ekhavis sian rezulton – Lena konsentis forveturi. Ekde tiu tago ili kune ekprepariĝis al la longa, nesciata vojo.

Tamen por Varvara Miĥajlovna almenaŭ la fina punkto estis konata. Ŝi intencis veturi al siaj parencoj laŭ la patra linio.

Verdire, ili loĝis for de Lednjov – je mil verstoj* – en la malgranda stacio de la Siberia fervojo. Tie ŝi intencis atendi ĝis kiam finiĝos la dua invado de la bolŝevikoj, kiu, ŝi tre esperis, estos same mallonga. Pri la parencoj de la mortinta edzo kaj lia fratino Lena ĝis nun ne aŭdis, sed se Varvara Miĥajlovna certigas, ke oni renkontos ilin dece kaj nepre loĝigos – kial do ili ne transloĝigu portempe?

Tamen la animo de la juna patrino ne estis trankvila. Kun peza antaŭsento pri iu proksimiĝanta plago Lena helpadis al Varvara Miĥajlovna prepariĝi por la vojo. Varvara Miĥajlovna la tempon ne perdis kaj tagon post ilia parolo vizitis la administrejon de la firmao «Urusov kaj K^o» kie interkonsentis kun la administranto, ke li prenos ŝin kun Lena kaj Tina en la vagonojn, kiujn al li disponigas la estro de la stacio kaj la milita komandanto, antaŭnelonge aperinta en Lednjov. La administranto tre volonte kontentigis la peton de la fratino de la mortinta regiona kuracisto Bogojavlenskij, ĉar, al lia miro, tre nemultaj oficistoj

* Versto – malnova rusia mezurunuo (1,0668 km).

de la firmao esprimis deziron evakuiĝi. Komence Varvara Miĥajlovna kolektis du valizojn kaj du pezajn ŝtofvolvaĵojn. Sed mallonge antaŭ la forveturo en la familia konsilio la virinoj decidis kunpreni nur plejajn necesajojn – la tolaĵŝanĝojn por si, pantalonetojn-ĉemizetojn por Tina kaj iom da manĝaĵoj: tri sake-tojn da grioj, kvar funtojn da sukero, sekpanaĵojn, salon – jen ĉio. Ili decidis prudente, ke duope, kun la infano surbrake, ne povos portaĉi valizojn kaj grandamplaksajn ŝtofvolvaĵojn. Se estus viva Aljoŝa, eblus ankaŭ la valizojn kunpreni.

Kaj la ruĝuloj ofensivis. De la staciaj telegrafistoj la lednjovanoj sciiĝis pri tio, ke jam multaj fervojaj stacioj estis konkeritaj de la Ruĝa Armeo. Ekis vastiĝi onidiroj, ke la urbon ĉirkaŭprenas taĉmentoj de ruĝaj partizanoj. La urbo zumadis. Laŭ la interkonsento en la tago de la forveturo Lena devis iri al la administrado de la firmao, preni tie la ĉaron kaj reveni kun ĝi al Varvara Miĥajlovna kaj la filino por kune forveturi. Tamen Varvara Miĥajlovna ne certis, ke Lena faros kiel necese. Konante kvietan karakteron kaj troan ĝentilecon de la bofratino, Varvara Miĥajlovna timis, ke Lena estos ne sufiĉe insista por ricevi la ĉaron, ĉar en la tumulto de forveuro homoj, kiel direblas, perdas la kapojn, iĝas tro historiaj, incitemaj. Eĉ pli: ŝin daŭre maltrankviligis la maldeziro de la bofratino forveturi el Lednjovo. Longe ŝi rompis la kapon, kiel organizi tiel, ke Lena ne trompu ŝin – ŝi tro ne volis resti en Lednjov! Por forigi ĉiujn dubojn kaj nepriki la forveturon, Varvara Miĥajlovna proponis la sekvan varianton: Lena iros morgaŭ frumatene en la administradon de la firmao kaj tie prenos la promesitan ĉaron. Mem Varvara Miĥajlovna kune kun Tina atendas ŝin hejme ĝis la dekdua horo. Se Lena al la dekdua ne sukcesos trovi la ĉaron, Varvara Miĥajlovna veturos per urba ĉevalĉaro al la stacio kaj tie ili renkontiĝos ĉe la vagonoj de Urusov.

«Se, gardu Dio, iukiale, kolombinjo, en tumulto de la forveturo – kaj la tumulto certe okazos – ni kun vi renkontiĝos nek ĉi tie, nek en la stacio, tiam ajnrimede, per ajna transporto ni devas pounuope atingi la stacion Lagutino», – klarigadis ŝi al turmentita de duboj Lena, ne lasante al ŝi iun varianton resti. – Ĉu vi aŭdas min? – severe demandis Varvara Miĥajlovna, incitita de la premita stato de la bofratino.

– Jes, – apenaŭ aŭdeble balbutis Lena.

– Lagutino estas nefore, – daŭrigis Varvara Miĥajlovna, – nur kvindek verstojn de ĉi tie. Tie loĝas la ĉefkuacisto de la fervoja malsanulejo Ilja Iljiĉ Proĥorov – tre bona amiko de la mortinta Aljoŝa. – Ĉu vi memorfiksis: Ilja Iljiĉ Proĥorov!

– Jes, memorfiksis. Sed timas mi sola veturi, – konfesis ŝi.

– Sed kiu diris al vi, ke vi nepre veturos sola? Tion mi tiel, por ajna ekstrema okazo diris.

Ne vane la antaŭvidema fratino de Aljoŝa diris pri tiu «ekstrema okazo». Ne vane. Lena venis al la administrado je la oka matene kaj trafis rotacion de la tumulto, kiu regis sur la areo, ĉirkaŭbarita per la paliso. Ĉiuj ne iradis, sed sin ĵetis el la kontoro al la deponejoj kaj reen, el la deponejoj sub aleron kun iuj sakoj. Ĉiuj serĉadis iun, estis pri nenio kontentaj. La administranto Jeloĥin nenie videblis. Lena time kuradis en la korto, demandadis, kie eblas trovi la administranton. Neniu lin vidis, neniu sciis, kie lin serĉi. Lena konsterniĝis, ŝi timis, ke ne sukcesos forveturi kun la firmao. Fin-fine sur la korto aperis la administranto. Lena sin ĵetis al li.

– Sinjoro administranto, ĉu vi donos al mi ĉaron, por ke mi povu veturi hejmen kaj kunporti la filinjon kaj Varvara Miĥajlovna?

La administranto ĉirkaŭrigardis la korton, ekvidis la elveturanton ĉevalĉaron, kiun koĉeris muĵiko kun

denshara fosileska barbo. Li montris direkten al la barbulo:

– Jen kun Kuzjma vi veturos, Jelena Ivanovna. Ŝajne, li kunprenos la lastajn kestojn kun la dokumentoj. Ne maltrankviliĝu, mi ordonos. Aŭ, tamen, vi mem tuj aliru lin kaj transdonu mian ordonon, ja mi povos delogiĝi.

Lena ĝuste tiel faris. Ŝi venis al Kuzjma, kiun ŝi bone konis, same kiel ankaŭ li ŝin.

– Kuzjma, kolombeĉjo! Mi ĵus parolis kun la sinjoro Jelofin. Li ordonis, ke vi ĉe la lasta itinero veturu al nia hejmo. Espereble, vi scias, kie mi loĝas, kiu mi estas?

– Scias mi, kiel mi ne sciu la edzinon de la forpasinta Aleksej Miĥajloviĉ, kvietigu Dio lian animon, – demetinte la kaskedon, Kuzjma sin krucsignis. Sed ĉu sufiĉos la loko sur la ĉaro – jen pri kio estas miaj duboj. Vi ja triopos, kaj, jen aĵetoj ĉu en dek valizoj. – Li kapsignis al la kvin ĉaroj, sur kiujn ŝarĝis siajn ujojn kaj valizojn oficisto de la firmao kaj liaj hejmanoj.

– Kion vi diras, kolombeĉjo Kuzjma Ignatjeviĉ, – ekkapneis Lena. – Ni kunhavas nur-nuran aĵligajeton kun tolaĵoj. Kien ni kun Tina surbrake, kun valizoj povas treniĝi?

– Bone! – ekĝojis Kuzjma, kvazaŭ ne la sata ĉevalo, sed li mem portaĉus sur sia ĝibo valizojn kaj ujojn. – Ĉio estos kiel decas, sinjorino Jelena Ivanovna. Ne dubu, Kuzjma Perĥunov ne trompos la atendojn.

Li tuŝis tirremenojn, – kaj la ĉaro ektondris laŭ la ŝtonegoj, per kiuj estis pavimita la korto antaŭ la enirejo de la firmao domo.

Ŝarĝistoj rapide plenigis lian ĉaron per kestoj de la kontoraj libroj. Kuzjma forveturis, por la ŝarĝado alvenis la ĉaro de la rufa, giganta Nikita.

Lena iris esplori, ĉu multe da ŝarĝo restis por la ĉaro de Kuzjma. Subite eksonis pafoj. Lena ektimis,

ĵetis sin en la kontoron de la administrejo. Post ŝi enkuris ankoraŭ kelkaj timigitaj virinoj. Neniu povis ion kompreni, kiu pafas, al kiu?

Al la domo de la Urusov-kontoro kaose alvenis iuj armitaj homoj, pafante por timigi. Komandis ilin cara oficiro de nedefinita rango. Ili ĉirkaŭis la domon kaj ĉiujn en ĝi deklaris mobilizitaj por rebati atakojn de la Ruĝa Armeo. Forpuŝinte de la korto la ĉaron de Nikita, la armitaj homoj ŝlisis la pordegon, surpostenigis ĉe ĝi sentinelon.

– Sed kiucele ni, virinoj, estas ĉi tie? Ni ja ne estas instruitaj pafi el fusiloj – kriis el la homamaso de fuĝemuloj la korpulenta damo Skovorodnikova, la edzino de unu el la firmaaj oficistoj.

– La inoj kuiras tagmanĝojn kaj laŭforte helpas en akcesoraj laboroj, – senapelacie anoncis la oficiro. La virinoj denove ekbruis. Multaj komencis kriprotesti. La oficiro denove ekis pafadon.

– Silenton! Sen histerioj, damoj kaj fraŭlinoj! – krivoĉis li. – Ne necesas. La bolŝevikoj proksimiĝas al la urbo. Se ni ne rebatos ilin, la sinjoroj ruĝarmeanoj devigos vin ne nur tagmanĝojn por si kuiru, sed ankaŭ tranĉeojn fosi, sakojn kun tero portaĉi. Ili ja ne ceremonios. Se vi ne ekdeziros teron fosi, la ruĝuloj* vin en ĝin enfosos kun la kuglo en la brusto. Pri tio estu certaj. Estas mi, kiu diras al vi tion – la stab-kapitano Arnold Ŝvimmer.

La virina aro eksilentis, timigita de negaja perspektivo fosi tranĉeojn sub la pafaperturoj de la bolŝevikaj pafiloj. Ĉe kelkaj, verdire, estis demando – kial fosi tranĉeojn, se la blankarmeanoj sen ajnaj tranĉeoj suferas malvenkon post malvenko kaj kaose retiriĝas, lasante ĉion kaj ĉiujn, por rapide kaj plej malproksimen fuĝi for de la kolero de la simpla popolo.

* Ruĝuloj kaj blankuloj estis akceptitaj nomoj de du kontraŭstaraj dum Civila milito armeoj.

El la supraj etaĝoj de la konstruaĝo, staranta sur la placo, estis trapafeblaj ĉiuj proksimaj stratoj. Ŝvimmer decidis krei el ĝi ion similan al fortikaĝo. La fenestrojn oni baris per mebloj, sur la subtegmento organizis mitralejon, la enirpordojn ŝtopis per sakoj kun faruno (lastajn jarojn Urusov vendadis farunon kaj grenojn). Sur la korto la armitaj homoj fosis kavon, plenigadis per tero sakojn kaj disportadis laŭ la etaĝoj, konstruante en la fenestroj embrazurojn. La aranĝo de la fortikaĝo estis finita al la dua horo posttagmeze, kaj ĉiujn mobilizitajn virinojn oni komencis ellasi po unu tra la pordego. Unu el la unuaj elkuris Lena.

Varvara Miĥajlovna sidis hejme kiel sur pingloj, sed Lena kun la ĉaro daŭre forestis. Ŝi jam kelkfoje elkuradis en la strateton, elirantan al la ĉefstrato, kiu gvidis al la stacidoma placo. Varvara Miĥajlovna refoje rigardis al la antikva surmura horloĝo. Ekis la unua horo. «Kie do ŝi estas? Kien malaperis, maltaŭgulino?» – incitite pensis Varvara Miĥajlovna pri la forestanta Jelena. La incito, tamen, baldaŭ ŝanĝiĝis je timo. Ŝi ja aŭdis pafadon en tiu flanko, kie situis la administrejo de la firmao. «Sed se la urbon jam invadis la ruĝaj? Mi ŝin insultas, sed eble ŝi kuŝas mortpafita?» – teruriĝis Varvara Miĥajlovna. Ŝi rapide vestis la nevinon, prenis ŝin surbraken, pli ĝuste, nestigis ŝin sur unu brako kaj per la alia prenkaptis la ŝtofvolvaĵon, kaj eliris. Pendiginte la seruron sur la eniran pordon, Varvara Miĥajlovna deperoniĝis. Nemaĵproksime ludis Nadjuŝka – la dekdujara filino de la kortisto Stepan.

– Nadjuŝa, – vokis ŝin Varvara Miĥajlovna.

La knabino lasis sur la fundamentŝtipo sian ludilaron – la ŝtofan pupon kaj la ŝtopitan per seĝpolvo pluŝan urseton – kaj alkuris al la onjo Varja.

– Nadjuŝa, kolombinjo, helpu al mi porti la ŝtofvolvaĵon ĝis la strato. Jam tempas por ni esti en la stacidomo, sed onjo Lena ial forestas. Helpu, kolombinjo. Mi pro tio al vi donaceton donos.

Nadjuŝa kun preteco konsentis.

Ili venis ĝis la fosto, post kiu komenciĝis la strato, kondukanta al la stacio. En la strato tien-reen rapidis pasantoj, bruegis laŭ la ŝtonegpavimo ĉaroj. Varvara Miĥajlovna atente fiksrigardis al la tumultantaj homoj, esperante ekvidi se ne mem Jelena, do almenaŭ iun el konatoj, oficantaj en la firmao «Urusov kaj K^o» por ion ekscii pri la bofratino. Neniu. Sed jen el la flanko de la stacidoma placo ekvidiĝis ankoraŭ unu ĉaro.

– Onjo Varja, onjo Varja, rigardu, estas la ĉaro de la sinjoroj Urusovoj! – ekkriis la knabino. – Ilia ĉaro, ilia!

Varvara Miĥajlovna malsupreniris al la pavimo. Kiam la ŝarĝoĉaro atingis ŝin, ŝi petis la koĉeron halti. La koĉero evidentiĝis esti Kuzjma, kiu ial senkaŭze ridetis.

– Kolombeĉjo, de kiuj sinjoroj vi estas? – por ajna okazo demandis Varvara Miĥajlovna.

– Nu, vi mem komprenas, verŝajne. – Kuzjma montris per la vipo al la jungarko. – De la sinjoroj Urusovoj mi estas, Via nobla moŝto, kaj oni nomas min Kuzjma, – la ĉaristo laŭte hikis. – Jen, ĥolero ĝin rongu, – hikado turmentas, ĉu vi komprenas? Pro kio? – ekridetis li.

Varvara Miĥajlovna nur nun distingis, ke la ĉaristo estas ebrieta. Eĉ pli.

– Kuzjma, kolombeĉjo, la sinjoro administranto promesis veturigi al la stacio min kun la filino (tiel ŝi malĉeeste prezentis al li Lena'n) kaj nepino. Ni kune kun la viaj devas forveturi. Lena, filino mia, servas ĉe la sinjoroj Urusovoj. Bogojavlenskij-familio ni estas.

Kuzjma ankoraŭ dematene, rompante difinitan severan ordon, englutis memfaritan brandon. «Kial do ne engluti dum tia tumulto», – rezonis li. Eblas supozi, ke la administranto hodiaŭ ne tiom atentos la ordon. Eĉ se li ion rimarkus, nenion al Kuzjma dirus. Nur la laboro daŭru. Kaj la laboro daŭris eĉ pli rapide, ol kutime. Tiel, almenaŭ, ŝajnis al Kuzjma mem.

– Do, vi diras, via moŝto, oni promesis vin veturigi al la stacio? – kantece redemandis Kuzjma. La rideto malaperis de liaj lipoj, kaj li pene ekcerbumis. – Ho, jes, mi rememoris! Nu, estis, sin turnis al mi matene la sinjorino Bogojavlenskaja. Bonaspekta tia, grandokula. Ĉu ŝi?

– Jes, ŝi, ŝi, – senpacience jesis Varvara Miĥajlovna.

– Sed, via moŝto, ĉiuj jam delonge forveturis al la stacio. Forveturis. Kaj la pordegon de la kontoro ŝlosis.

Vidinte, kiel ektimis Varvara Miĥajlovna, la bonkora Kuzjma hastis trankviligi ŝin.

– Vi ne nervoziĝu, via moŝto. Ŝin, verŝajne, Nikita forveturigis. Eble, por mia lasta ĉaro tute mal multe da ŝarĝo restis – do jen, la administranto ordonis ĉion ŝarĝi al la ĉaro de Nikita. Hastis ĉiuj, kiel ŝafoj tra la korto tumultis. Nu, Nikita, ĉu ne, ekis kun la tuta ŝarĝo rekten al la stacio. Kaj la sinjorino kune, ĉe la pakaĵoj, kiel akompanantino. Tie, en la kontoro, tia baraktado estis.

Tiu argumento de Kuzjma iom trankviligis Varvara Miĥajlovna.

– Vi ne nervoziĝu, via moŝto, – plu trankviligis Kuzjma. Ja ankaŭ mi povas veturigi vin al la stacio. Tie vi revidos vian filinon.

Trasentinte la situacion de la ĉagrenita aĝa virino kun la infaneto surbrake, Kuzjma eĉ iom sobriĝis. Li desurĉariĝis, prenis la portaĵon kaj metis ĝin sur la krudtolon. – Sidiĝu, via moŝto, mi tuj vin alvenigos.

Varvara Miĥajlovna ekhastis, helpata de Kuzjma surgrimpis la ĉaron, forgesinte doni al Nadjuŝa la promesitan donaceton, kaj ili ekis.

– Dio mia, kiel okazis? – veis Varvara Miĥajlovna. – Kiel ŝi forveturis sen mi, sen la filinjo? Kaj se ŝi forveturis, kie ŝi estas?

– Ver-vere, via moŝto, forveturis ŝi al la stacio, – turninte sin al la veanta virino konvinke vortumis Kuzjma. – Mi volis ankoraŭ ion forveturigi, restis ankoraŭ iom da aĵoj en la korto, kaj samfoje ankaŭ vin kun la filinjo, kiel ordonis la administranto. Do, jen, alvenas mi, tiel, al la pordego, sed ĝi ŝlosita estas, kaj soldato staras, gardisto do. Mi diras al li, al la gardisto tiu sama: «Mi bezonas en la korton por la sinjoraj aĵoj». – Kaj li al mi responde, tiel: «Forveturis jam ĉiuj, ne plu estas la kontoro ĉi tie, sed – artileria pozicio. Veturu, – li diras, – avo, hejmen». Simpatia tia knabĉjo kaj – gravas – ne kolera. Sed li ja estas gardisto, kun la pafilo staras. Ho, tiuj gardistoj estas tia popolo, multaj diras: «Ne licas – kaj ĉio». Jen, okazas, alvenas vi al armea deponejo, tie ja nepre gardisto staras. Krias: «Haltu kaj ne moviĝu!» Poste, tiel, ekfajfas – tio signifas – la pli altrangan vokas. Sed tiu ĉi soldaĉjo nek kriis, nek fajfis, sed simple bonkore diris: «Veturu, avo, hejmen». Simpatia knabĉjo. Por la lasta veturigo devis resti ne pli ol tri kestoj. Mi, do, por ili venis, sed Nikita, verŝajne, ilin aligis. Nu, filinjon vian nestigis, sed por via moŝto jam loko ne restis. Tiel li, do, rekte

al la stacio veturis, – rezonis Kuzjma, kiu, estante postdrinketa, ŝatis paroladi, jes, ŝatis.

– Sed se ŝi forveturis kun Nikita, kial do ŝi ne desurĉariĝis ĉe nia interstrateto kaj ne vizits la hejmon? – rompis lin Varvara Miĥajlovna.

– Nu, kiel al vi diri, via moŝto? Forgimpi de-sur la ĉaro, kaj poste atendi lin, la marĉkoboldon. Ja li hodiaŭ, samkiel mi, komuniis. Povis li eĉ la adreson forgesi, ebrieta. Tiel jen, la filinjo via, ebl-e-e, decidis: iri kun li al la stacio, tie malŝarĝiĝi kaj kun li hejmen, malplenĉare.

Tiu ĉi rezono de Kuzjma, finfine, trankviligis Varvara Miĥajlovna. Des pli, ke mem Kuzjma jen-jen ankoraŭ hakis, kio sufloris al la sagaca Varvara Miĥajlovna pri la tutverŝajna evoluo de la eventoj, proponita de la koĉero.

Sed la trankviliĝo baldaŭ denove ŝanĝiĝis al la embaraso.

– Jes, eble, vi pravas, Kuzjma, sed se ni ne samtempos?

– Ne samtempos, ĉu? Ne maltrankvilu bonvole, via moŝto. Ne dubu – ni samtempos.

Ili venis al la stacio. Apud la pordeto de la bariolo staris la ĉaro de Nikita. Kuzjma venis al li, ekis demandon pri la lasta veturo. Reveninte, li raportis al la maltrankvila pasaĝerino kun la knabineto surbrake:

– Do, via moŝto, ĉio enordas. Ĉiuj el la kontoro forveturis, ĉiuj estis kun la aĵoj.

– Sed kie estas ili? – ekvoĉis Varvara Miĥajlovna.

– Ĉiuj estas en la vagono, sinjorino, – informis alveninta Nikita.

Demandi Nikiton pri Lena ne estis senco, apenaŭ li memorfiksis ĉiujn homojn, veturintajn kun li sur la ĉaro. Des pli, ke, laŭ la rakontoj de Kuzjma, al la stacio Nikita veturadis ne unufoje.

Aldone, Nikita estis konsiderinde nesobra, kaj de li forte fiodoris postdrinke.

– Jen tie estas la lasta vagono, – fingremontris ien reen Nikita. – Tie estas ĉiuj gesinjoroj. Aŭskultu, Kuzjma, – sinturnis li al la partnero. – Onidiro estis, ke al la nia oni promesis du vagonojn, sed jen donis nur unu. Sed ne gravas, ĉiuj enlokiĝis. – Nikita revenis al sia ĉaro, sidiĝis sur ĝin kaj forveturis.

Al la pordeto venis suboficiro kun la rubando surmanike. Tio estis deĵoranto.

– Bon-homo, – sinturnis al li Kuzjma. – Jen, ŝia moŝto ete malfruis. Ili bezonas al la vagono de Urusovoj. Ŝia filino tieas ĉe la aĵoj.

– Mi petas afablege, – kun preteco reeĥis la suboficiro kaj manmontris al la kajo. – Tie estas la plej lasta vagono por la oficistoj de la Urusov-firmao.

La gardisto enlasis Varvara Miĥajlovna al la kajo, kaj Kuzjma sidiĝis sur la ĉaron, returniĝis kaj ekveturis hejmen. Kapturninte li ekvidis, kiel Varvara Miĥajlovna, akompanata de la deĵoranto, iris al la kajo.

Elirinte ekster la pordegon, Lena rapidkuregis hejmen. Ŝi jam bone studis senpacienca karakteron de Varvara Miĥajlovna kaj konjektis, ke tiu ne toleros resti hejme kaj certe jam forveturis al la stacio, dunginte iun koĉeron.

Alkurinte la kajon, Lena ekvidis seruron kaj ekstrebis al la ĉefstrato. Bonŝance, ŝi tuj ekvidis la alvenantan ĉaron de Kuzjma.

Lena ĵetis sin al la ĉaro.

Kuzjma apenaŭ sukcesis bridhaltigi Orlikon.

– Kuzjma, kolombeĉjo, kial vi tiom malfrue veturas? Sola mi restis, – eklamentis Lena.

– Sinjorinjo, ne maltrankviliĝu bonvole, ĉio enordas. – Kaj Kuzjma rakontis al ŝi plendetale ĉion, kio okazis post lia lasta veturo kun la pakaĵoj al la stacio.

Apenaŭ finaŝkultinte la rakonton de la ebrieta Kuzjma, Lena ekkuris al la stacio.

Ekvidinte la deĵoranton, Lena, apenaŭ spirante, demandis:

– Sinjoro oficiro, ĉu mi sukcesos al la trajno de la sinjoroj Urusovoj? Tie estas mia panjo kun mia filinjo.

La afabla oficiro kompateme mangestis:

– Mi multe bedaŭras, sinjorino, sed vi malfruis. La vagonaro jam eliris al la ĉefvojo kaj senhalte veturos ĝis la stacio Lagutino. Mi per nenio povas helpi, damo.

Lena aŝkultis, anhele spirante. «Vane mi kontraŭ Varvara Miĥajlovna ofendiĝis. Jen venis ŝia “ekstrema okazo”», – trafalmis en ŝia kapo. Ŝiaj belaj okuloj larmpleniĝis. Kaj, ne dirante eĉ vorton al la oficiro, ŝi iris al la placo. Eksonis laŭta lokomotiva fajfo, el-post la stacidoma konstruaĵo aperis la vagonaro, forveturiganta ŝian admiratan Tina'n kun Varvara Miĥajlovna. Lena ekkuris al la ŝoseo:

Preskaŭ tuj malantaŭ la stacidomo reloj de la ferovojo turniĝis abrupte dekstren kaj, post duonkilometro, eliris al aĵura ponto, tenanta la relojn super la sufiĉe larĝa rivero Atolka.

Somere buboj, loĝantaj apud la stacidomo, ofte vete konkuris kurante de la stacio ĝis la ponto. Kaj ĉar neniu maŝinisto povis tuj akiri indan rapidecon de la lokomotivo, la buboj ĉiam antaŭis la trajnon kaj pli frue ol ĝi trafadis al la ponto. Kelkaj eĉ sukcesadis iom trankviligi la spiron: ja kuris ili laŭ la rekto, oblikve al la ponto.

Jen Lena senmetafore flugegis laŭ la sama vojeto al la ponto.

Ŝi rapidege kuris kaj atingis la ponton pli frue ol la trajno.

Malsupre bruis Atolka. Kaj preskaŭ tuj alproksimiĝis la trajno. Jen ĝi surruliĝis la ponton, post ĝi tiriĝis la vagonoj. «Kie, en kiu vagono veturas miaj karulinjoj?» – ekpanikis Lena, sed tuj rememoris la vortojn de Kuzjma: «En la lasta». Jen ĝi, tute proksima, la lasta. Tutcerte, Varvara Miĥajlovna ankoraŭ ne foriris de la fenestro. «Ŝi same baraktas tie, kiel mi», – trafalmis en la kapo la diveno. Lena volis krii al Varvara Miĥajlovna, ke ŝi estas ĉi tie, ke soldatoj haltigis ŝin en la kontoro de Urusovoj, kvankam ŝi konsciis, ke Varvara Miĥajlovna ne ekaŭdos ŝin. Ankaŭ ne ekvidos. Sed tamen ŝi kriis atinge al la preterpasinta lasta vagono: «Var...» – fini ŝi ne sukcesis: eksonis terura eksplodo kaj la pontoparto kun la lasta vagono brufalegis en la tempestan akvon de Atolka.

Skuanime ekkriis Lena, falis sur la taluson, apenaŭ ne batinte la nukon kontraŭ la relo. Rekonsciiĝinte, ŝi ekvidis kliniĝintan al ŝi vizaĝon de nekonata oldulino. Malantaŭ ŝia dorso staris grizhara, kiel cirkuo, maljunulo kun bonordigita barbeto.

– Karinjo, gloron al Dio, viva! Kaj ni kun la oldulo pensis, ke vi ne rekonsciiĝos. Jen kiel ektimis la tondron diablan, – rukulis la oldulino kun la bonkora vizaĝo, ruĝvanga, sen eĉ unu falto.

Lena denove fermis la okulojn. Ŝi penis rememori, kie ŝi estas, kio okazis al ŝi. Kaj jen en la obskuro de la forgeso ekflamis la eksplodo, baŭmis la vagonoj de la trajno kaj ĝi – brufalegis en la akvon. «Tie ja estis mia filino kaj Varvara Miĥajlovna!» – teruriĝis Lena kaj denove malfermis la okulojn.

Evidentiĝis, ke trovis ŝin la maljunuloj Sava-teevoj, loĝantaj en la ĉeranda domo. Ĉi tie, apud la

taluso, paŝtis sin du kaprinoj de la geolduloj. Kiam ektondris la eksplodo, la maljunuloj komence forte ektimis. La oldulino en subplankejon volis ensalti, sed la oldulo ŝin retenis. Rigardinte trafenestren, la maljuna soldato aĥis kaj tuj komprenis, kio, pro kio, kaj kial.

– Atendu, oldulino, gastojn. Tio ĉi la nova potenco pri si signalis. Estis ponteto – kaj ne plu. Nu, ne aĥu vi, tumultema. Prefere ni iru la kaprinojn rigardi. Ĉu ilin hazarde la splitoj ne mortbatis.

La kaprinoj de la geolduloj Svatevoj sin paŝtis, kvazaŭ nenio speciala okazis. Tiu ĉi bruto kornhava, kvankam evitema estas, timema, tamen rapide ĉion forgesas. Sed apud la ponto la gemaljunuloj ekvidis kuŝantan virinon.

Estis jam malfrue. La geolduloj ne lasis Lena'n hejmen, kaj apenaŭ ŝi hejmingus.

Nur sekvan tagon, vespere, Lena venis al la konata perono.

Enirinte la ĉambron, ne malvestiĝinte, ŝi kuŝiĝis sur la divanon kaj lasis la larmojn flui. Ŝi ploris amare kaj longe. Post la sunsubiro ekstreme de la urbo eksonis la fusila pafado kaj ĉirpaĉo de mitralaj kuglostrioj, eksplodoj de grenadoj. Ĉe urborando okazis bataloj.

Lena kelkajn tagojn ne eliris el la hejmo. Dufoje tage ŝin vizitadis Nadjuŝka, tiu sama filinjo de la kortisto Stepan, kiu akompanis Varvara Miĥajlovna kaj Tina «en la lastan vojon», kiel ŝi diradis, ĝemante oldulineske.

Baldaŭ en Lednjov estis proklamita la Soveta potenco. Pri tiu novaĵo al Lena informis la sama Nadjuŝka, kiu rerakontadis al ŝi komunikojn de la patro.

Ĉu kuŝi, ĉu ne kuŝi, sed la vivo ordonis leviĝi. Magra ŝparaĵo degeladis, en la bazararo ĉio estis tre multekosta, kaj por ricevi la porcion* necesis labori.

* Porcio – manĝaĵo, ricevata kontraŭ manĝokartoj.

Krome estis bezonataj hejtlignaĵoj – la vintro embuskis malantaŭ ne tiom foraj montoj. La lignaĵoj bezonatis multaj. Bone pensinte, Lena decidis por tre kuraĝa ago. Triĉambra alo, en kiu ili loĝis, apartenis al Varvara Miĥajlovna. Vendi la alon Lena ne povis, ĉar ŝi ne havis posedrajton kaj pruvon pri la morto de la mastrino. Ĉion el la mebloj kaj instalaĵoj, kion ŝi povus bezoni, ŝi, kun helpo de la kortisto Stepan, transportis en la angulan ĉambron, eksan gastosalonon, kaj du ceterajn, manĝejon kaj dormejon, ŝi ordonis okupi al mem Stepan kun lia familio. Stepan, samkiel preskaŭ ĉiuj kortistoj en Lednjov, antaŭ tio amasloĝis kun la familio en la sola kelo. Sed eĉ apero de la najbaroj en la alo ne helpis: dum noktoj ŝi preskaŭ ne dormis. Kaj ĉu eblas endormiĝi, se ĉiu angulo memorigadis pri la pereintoj.

Venadis mateno, kaj ŝi denove vidis la aĵojn, kiujn tuŝis la manoj de Varvara Miĥajlovna, de la filino. Ĉio, ĉio ĉi tie memorigis pri ili! Kaj Lena decidis serĉi en la urbo alian loĝejon. Ion el la aĵoj kaj manĝilaro ŝi estis devigita vendi. Baldaŭ al ŝi bonŝancis – ŝi trovis negrandan angulan ĉambron, kun la fenestro al ĝardeno.

Sub la fenestro kreskis la siringa arbusto, kiun Lena ŝategis. El la mebloj al la nova loĝejo nenion necesis kunpreni – en la ĉambro, kie lokiĝis Lena, antaŭ ŝi loĝis la mastra filino, kiu antaŭnelonge sukcese edziniĝis.

Ŝi eĉ ne remetis la meblon, por krei iluzion, ke ĉio tiel staras antaŭlonge, kaj ŝi loĝas ĉi tie antaŭlonge, kaj ke ĝenerale en ŝia vivo nenio okazis. Ŝi ja estis ankoraŭ tiom juna kaj tial naiva.

En la urbo iĝis multe pli silente: la negocistaj butikoj estis fermitaj, bazaraj tagoj malplioftiĝis. Kaj la bazara tago eksimilis al la ordinara. Estis malfermitaj nur la kooperativaj butikoj, en kiuj laŭ la manĝkartetoj estis donitaj la magraj porcioj.